*Messaging*), elektronikaj memorsubtenoj, interretpoŝto k.t.p. –, la retigita kaj kabligita mondo suferas pro "kogna superŝarĝo kaj seninterrompa konstanta atento". Oftaj intersekvaj interrompoj povas obstakli la kapablon "daŭre por pli longa tempospaco direkti sian tutan atenton al unu persono aŭ unuopa perceptaĵo kun la sekvo, ke oni neniam sukcesas efektive fini ion per unu tiro", raportas la magazeno *Newsweek*. Tiaj deturnoj povas esti la kaŭzo por perdo de la memorkapablo aŭ malforteco de la memorpovumo kaj rezultigi eĉ pli detruajn sekvojn. (*Erwachet*, Feb. 2010, p.30)

## Ĉu unue unuĝiba aŭ duĝiba?

Centmilojn da jaroj aĝaj estas la ostoj de iu prakamelo, kiu estas elfosita en la siria dezerto. Ili estas trovitaj en la stepa regiono *El Kwam*, 120 km malproksime de la antikva Palmiro (*Palmyra*). Ekde miliono da jaroj tiu loko estis elekloĝata de homedoj, kiuj siatempe certe ankaŭ ĉasis kaj mortigis la kamelecan praulon. La prakamelo apartenas al ĝis nun nekonata kamelospecio de giganta grando, duoble alta ol la hodiaŭaj kamelspecioj: kun ŝultroalteco de pli ol 3 m ĝi estas preskaŭ tiom alta kiom la nuntempaj ĝirafegoj. La trovaĵo certe helpos klarigi la evoluon de la kameloj, pri kiu ne multo estas sciata – ĝis nun ekz. ne estas klare, ĉu unue vivis la unuĝiba dromedaro aŭ la duĝiba kamelo. La trovita prakamelo ĉiuokaze estis dromedaro.

(2007-10-17)

## Kristnask-arbo en la "Blanka Domo"

Kio nuntempe apartenas al ĉiujara kutimo de la usona prezidenta familio, tio komenciĝis en la jaro 1889 sub la prezidenteco de *Benjamin Harrison* (1833-1901). La prezident-edzina moŝto s-ino *Caroline Lavinia Harrison* enkondukis la tradicion de kristarbo el la bona olda Eŭropo en la Blankan Domon. Kun kandeloj, lampeto kaj ĉio kio koneksas al tio. Kaj eĉ pli da lumo ekloĝiĝis en tiu ĉi Harisona oficperiodo (1889-1893) en la usona potenc-centro: printempe de 1891 la "Edisona Kompanio" (*Edison Company*) ricevis la komision instali en la Blanka Domo elektrajn lum- kaj sonoril-konduktaĵojn. Tiun tute ne sendanĝeran laboron faris juna elektristo de la entrepreno (kiu post la fino de la instalado restis en la Blanka Domo, poste fariĝis ceremoni-estro kaj restis dum 42 jaroj kiel servanto de usonaj prezidentoj). Prezidento *Harrison* postlasis – krom la sonorilojn kaj lumobjektojn – tre rimarkindan eldiron: "Dio nin usonanojn ne destinis esti la mondopolico". Li nuntempe apartenas al la forgesitaj blankadomaj oficperioduloj. (2009-12-24)



## Birdo de la jaro 2011 – ruĝvosta*



Tiu, kiu pensas, ke la ĝardeno estas la ideala biotopo por la "ĝardena ruĝvostulo", forte eraras. *Phoenicurus phoenicurus*, la fenikuro, estas arbara birdo: tipa loĝanto de maldensa maljunarbejo kaj indikulo de unurange bona habiteja kvalitogrado. Do, malkompakta arbaro kun fagoj kaj kverkoj aŭ apudriveraj herbejoj estas ĝia hejmo. Kaj same tombejoj, setlejoj, park-pejzaĝoj kaj fine ankaŭ ĝardenoj. Ĝi nutras sin per insektoj kaj araneoj, kiujn ĝi – ekde ĉas-sidejo – kaptas en mallongaj predatakoj. Elektante la nestlokojn ĝi preferas ion inter kavo kaj niĉo: arbotruoj, muroniĉoj, malvastejoj sub tegoloj aŭ malantaŭ arboŝelo, rokfendejoj kaj ĉiuj alispecaj kavaĵoj. La ĝardena ruĝvostulo estas svelta kantobirdo, kiu konstante sin tenas rekte staranta kaj okulfrapas pro la daŭra vostotremado. La maljunajn masklojn markas brilaj plumaraj koloroj: blanka frunto, nigra gorĝo, oranĝ-ruĝ(et)aj brust- kaj ventropartoj kaj ruĝa vosto, dum la femaloj ĝenerale estas pli modeste kolorigitaj.

Kun ĉirkaŭ 14 cm la ĝardena ruĝvostulo havas la grandecon de la granda paruo (*Parus major*), krom la pasero (*Paser domesticus*) unu el niaj plej oftaj hejmaj ĝardenbirdoj. La nuna havaĵo de fenikuraj paroj tamen reduktiĝis en Germanujo al inter 110 000 kaj 160 000 – antaŭ 30 jaroj ekzistis da tiuj ankoraŭ 450 000, do kvaroble pli. Ĉar ĝi malaperis el multaj vilaĝoj kaj urbetoj, oni nur bonŝance renkontiĝas kun tiu bela birdo. Kiel insektomanĝanto ĝi transvivas la eŭropan vintron en la humidaj savanoj de la centra Afriko. Sed ĉie laŭlonge de la birdomigrada vojo atendas danĝeroj: grand-areaj monokulturoj, profesia birdoĉasado kaj la sekvoj de la klimata ŝanĝiĝo kun pli oftaj sekecperiodoj en la mediteranea kaj sahelaj zonoj.

Kontraŭe al la longdistanc-migrula ĝardenruĝvostulo, ĝia proksima parenco, la doma ruĝvostulo (*Phoenicurus ochruros*) estas mallongdistanc-migrulo, kiu transvintras en la mediteranea regiono aŭ eĉ pli kaj pli en niaj eŭropaj landoj mem. Ĉu ankaŭ la ĝardenruĝvostulo iam kapablas fari tion? Ni helpu gardi kaj protekti la vivospacojn de tiu nun jam endanĝerigita birdospecio. (*R. Sachs*, SR-redaktoro)

* La germanuja Naturprotekta Unuiĝo *NABU* per la elekto de "Vivaĵo de la Jaro" celas, ke la publiko pli konscience atentigu nian mondon kun ĝia bestoj kaj plantoj.